

FERVOJISTO

Oficiala organo de Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj. Dumonata fakrevuo pri fervojo, tramvojo kaj aeronauŭfiko.

Redaktoro Josef Blažek, inspektoro de ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj en Olomouc, Müllerova ulice č. 24. Akceptas ĉiujn manuskriptojn por la revuo. — Administristo kaj responda redaktoro Emanuel Kubásek, revizoro de ĉs. ŝtataj fervojoj en Plzeň, Lobežská ul. č. 12, kiu akceptas ĉiun monon por I. A. E. F. kaj la revuo «La Fervojisto».

Jara kotizo por la asocia jaro 1923—1924 estas jene fiksita: 15 Kč por Ĉeĥoslovakujo; 15 lirojn por Italujo; 6 frankojn svisajn por Svisujo; 12 francajn frankojn por Francujo kaj Belgujo; 6 ŝilingojn por Anglujo; 3 dolarojn por Ameriko; 6 jenojn por Japanujo. Por ceteraj landoj oni pagas 6 svis. frankojn. Por la membroj loĝantaj en Germanujo, Aŭstrio, Magiarujo, Polujo, Rusujo oni fiksas la kotizon je 2 svisaj frankoj. Novaj membroj (aliĝantoj) pagas al tio ankoraŭ enskribopagon proksimume la kvinonon de la supre fiksita sumo. La fakrevuon «La Fervojisto» ricevas ĉiu nia ano, kiu pagas por la asocia jaro 1923—1924 sian kotizaĵon, tute senpage.

P. T.

Neminite-li zůstati členem (případně přihlásiti se za člena) I. A. E. F., raĉte laskavě obratem zaslati toto číslo zpět se sdělením, že z našeho sdružení vystupujete. Zůstanete-li však našim členem, zašlete laskavě ihned členský příspěvek (časopis obdržíte zdarma) pro rok 1923—1924 Kč 15.—.

Se vi ne intencas resti membro de nia Asocio (aŭ se vi ne volas aliĝi al ĝi), bonvolu poŝtrevene resendi ĉi tiun numeron «La Fervojisto» kun la sciigo, ke vi eksigās. Sed se vi restos nia ano sendu tuj la kotizaĵon (la revuon vi ricevos senpage) por la jaro 1923—1924, kiel montras la tabelo sub la titolo.

La komitato de I. A. E. F.

INVITO.

Estimataj ĉiulandaj gefervojistoj!

Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj, kiu estis refondita dum la XIIIa Universala kongreso de Esperanto en Praha, ne malaperis, kiel eble opinias kelkaj niaj anoj.

Al ĝi nur ne sukcesis fondi taŭgan propran fakrevuon pro malbonaj financaj cirkonstancoj kaj tial bedaŭrinde la anoj de I. A. E. F. restis sen regula informado asocia. Bela, grava estas nia programo, starigita jam en Barcelona dum la V-a Universala kongreso de Esperanto.

Por povi solvi tiun ĉi problemon, la komitato invitas ĉiujn siajn membrojn al ĝenerala kunveno de I. A. E. F., kiu okazos de la

2—8. de aŭgusto 1923 en Nürnberg, kie oni devas pridiskuti jenajn programpunktojn:

1. Raportoj de s-roj komitatanoj pri organiza laboro, diskuto pri ĝis nuna situacio de I. A. E. F.

2. Raportoj de ĉiulandaj asesoroj kaj delegitoj.

3. Decido, ĉu fondi fakan revuon de I. A. E. F., ekkonata kaj redaktota de I. A. E. F. mem, aŭ ĉu I. A. E. F. sin aliĝos al ia serioza jam aperanta gazeto internacia, ekz. «La Policisto», kies 6semajna regula kaj memstara aldono estus nia «La Fervojisto».

4. Starigo de jarkotizaĵoj, enskribopagoj, abonpagoj por la fakrevuo por la jaro 1923—1924.

5. Elekto de I. A. E. F. asesoroj por landoj, kiuj ilin ankoraŭ ne posedas (event. delegitoj).

6. Proponoj de I. A. E. F. komitato; pri aliaj proponoj oni povas diskuti nur, se ilin laŭ la statutoj ricevas la komitato 10 semajnojn antaŭ la ĝenerala kunveno. Tiurilatajn proponojn kolektos tiuĉiujare ĝis la 15. de julio 1923 nia vicprezidanto s-ro Josef Blažek, Olomouc, Müllerova 24, Ĉeĥoslovakio.

Nia kara amiko el Nürnberg, s-ro Oskar Schlicht, fervoja supersekretario, kies adreso estas Roth bei Nürnberg, Hipoltsteinerstrasse n-o 363, laŭ informoj nune ano de loka kongresa komitato en Nürnberg, afable promesis al mi, ankaŭ kune kun aliaj niaj spertaj samfakanoj, nome s-ro Karl Hell, fervoja inspektoro, limstacio Cheb (Eger), Ĉeĥoslovakujo, Jakob Hechtel, supera sekretario, München, Siegidiedstrasse n-o 18/3, Bavarujo, fari ĉion eblan, kio estos bezone por bona aranĝo kaj sukceso de estonta fervoja fak-kunsido en Nürnberg de 2—8. de aŭgusto 1923.

La ĉefa gvidanta persono en tiurilataj aranĝaj laboroj asociaj restas ĉiam s-ro Georg Habellok, fervoja inspektoro, Breslaŭ 10, Schleirmacherstrasse n-o 19, nia estinta prezidanto.

Gefervojistoj ĉiulandaj! Estu konviktaj, ke la komitato plenumadis ĉiam sian, en Helsinko ricevitajn taskojn laŭ siaj plej bonaj intencoj kaj fortoj.

Bedaŭrinde la I. A. E. F. komitato ne havas alian rimedon pli taŭgan, ĉar ne ekzistas ĝis hodiaŭ interligilo dezirata — nia propra internacia, almenaŭ dumonate aperonta fakrevuo, »La Fervojisto«, ol nur la ĝenerala fak-kunsido, kie oni povas raporti, diskuti kaj decidi. La I. A. E. F. komitato estas konvinkita, ke ĉiuj niaj anoj, ankaŭ novaj samfakanoj, kiuj povas partopreni la XVan en Nürnberg, ne forgesos viziti niajn fak-kunsidojn fervojajn.

Se niaj ĉiulandaj s-roj asesoroj aŭ delegitoj fervore kunlaboros kun la I. A. E. F. estraro kaj se ili varbos kaj garantios por ĉiu lando minimume 50 abonantojn por nia fakrevuo »La Fervojisto«, tiam ni sukcesos eldoni regulan ĉiunonatan fakrevuon, aŭ ni povus aliĝi sukcesplene tute memstare al iu alia jam ekzistanta granda kaj serioza revuo (gazeto).

En Helsinko dum la XIVa Universala kongreso de Esperanto 1922 estis aprobitaj jenaj statutoj:

Statutoj

de la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj.

(I. A. E. F.)

Nomo kaj celo:

»Internacia asocio de la esperantistaj fervojistoj« kiu celas:

- a) propagandi kaj instrui la lingvon E. inter la fervojistaro,
- b) eldoni fakajn terminaron kaj fakrevuon,
- c) plifaciligi al la geasocianoj kaj iliaj familianoj la vojaĝadon kaj restadon en eksterlando,
- d) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco.

La asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco kaj politiko. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj en ĉiujn oficojn.

Membreco:

La membreco de la asocio konsistas el

- a) membroj aktivaj,
- b) membroj subtenantaj,
- c) membroj dumvivaj (kiuj pagas minimume 100 frankojn svisajn),
- d) membroj honoraj.

Membro aktiva povas fariĝi ĉiu fervojisto, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, kiu pagas la kotizon kaj plenumas la postulitajn kondiĉojn.

Ĉiu fervojista asocio, aŭ entrepreno (ne esperantista), kiu pagas la postulitan kotizon, rajtas aliĝi al la Asocio kiel membro subtenanta.

La membreco finiĝas:

- a) kiam la ano ne pagas sian kotizon ĝis fino de la asocia jaro,
- b) per skriba eliĝdeklaro al la estraro de la asocio,

c) la eksigo okazas, se la membro agas kontraŭ la bono de la asocio,

d) la eksigita membro rajtas apelacii kontraŭ sia eksigo ĉe la jarkunveno.

La regula kotizo por la jaroj 1922/1923 por membroj aktivaj kaj subtenantaj estas jam menciita. (Ĝi estos ĉiujare denove starigota).

Membroj subtenantaj pagas tiujn samajn prezojn, sed ili ne voĉdonrajtas. La kotizo ĉiujara estas fiksata denove de la jarkunveno. La kotizo estas pagata al la kasisto en nacia mono, per registrita listero, aŭ per bankĉeko aŭ respondkuponoj. Ĉiu membro, kiu pagis la koncernajn kotizojn, ricevas legitimacion (membrokarton), kiu estas prolongita ĉiujare, kaj »La Fervojisto« senpage.

Administracio.

La estraro konsistas el:

- a) la prezidanto kaj vicprezidanto,
- b) la sekretario,
- c) la kasisto kaj
- d) unu asesoro el ĉiu lando, inter kiuj devas esti la redaktoro de la asocia organo. Asesorojn elektas nur la landoj, kiuj havas membrojn en la asocio.

La estraranoj estas balotataj de la asocia jarkunveno per absoluta plejmulto por la tempodaŭro de du jaroj. La estrara sidejo estas la loĝloko de la prezidanto, aŭ vicprezidanto.

La prezidanto reprezentas la asocion ĉiufianken. La estraro kunvokas la jarkunvenon (ĉefkunvenon) (ĉiujare, plejparte okaze de la Universala Kongreso de Esperanto) kaj publikigas la tagordon almenaŭ 13 semajnojn antaŭ ĝia okazo.

La proponoj diskutotaj en la ĉefkunveno ne devas alveni al la estraro pli malfrue ol 10 semajnojn antaŭ la kunveno kaj devas esti skribitaj en Esperanto.

Disiĝo.

La disiĝo de la asocio povas okazi nur, se 4/5 de ĉiuj membroj pro tio voĉdonas. En tiu okazo la havajon ricevas la unuigita Konstanta Repraentaro.

Post la aprobo de koncernaj paragrafoj en la regularpropono oni elektis sekvantajn funkciantojn:

Kiel prezidanton: s-ron G. Bontemps, Francujo, Colombes (Seine) 4 Villa de Cerises,

kiel vicprezidanton: s-ron J. Blažek, Ĉeĥoslovakujo, Olomouc, Müllerova 24,

kiel sekretario: s-ron J. Barvič, fervoja konsilanto, Ĉeĥoslovakujo, Brno, ĉe fervoja direkcio, departemento H.,

kiel kasiston: s-ron E. Kubásek, Ĉeĥoslovakujo, Plzeň, Lobežská 12, kaj unu asesoron por ĉiu aliĝinta lando. Kiel asesoroj s-ron H. Salokannel, por Finnlando, stacio Laihla, s-ron G. Habellok, Germanujo, Breslaŭ 10, Schleirmacherstr. 19, s-ron H. Bonnevie, Norvegujo, Kristiania, Bergsinien 11, s-ron K. A. Elfving, Svedujo, Vesteras Lindero 3, s-ron J. Ivánovič, samtempe por redakcio de »La Fervojisto«. Je la fino de la fak-kunsido s-ro Blažek informas la konferencanojn pri sia sĝlutparolo al la gekongresanoj de la XIVa, farita en la 2a laborkunsido de la Kongreso.

Dum la dua kunsido, kiu okazis je la 14a de VIII, kaj en kiu partoprenis 7 anoj el 4 landoj oni decidis, ke:

La membraro de la asocio speciĝas je a) aktivaj, b) subtenantaj, c) dumvivaj kaj d) honoraj membroj. Plue ke la estraro estu kompletigota per 1—3 asesoroj el ĉiuj landoj kaj per la redaktoro de la fakgazeto. La asesoroj mem elektas siajn helpantojn, aŭ delegitojn.

La abonpago estu ĉiam sendota al la redaktoro de la fakrevuo. (Nun al «La Policisto», Budapeŝt IX., Üllői-ut 59., IV. 8, Hungarujo.)

Esprimita estis la deziro, ke multaj kunhelpu al s-ro Habelloĉk en la verkado de la fakterminaro. S-ro Blažek estis komisiita sendi dankleteron al la antaŭa prezidanto. Fine s-ro vicprezidanto per elokventa parolado dankis al ĉiu, kiu kunlaboris la helpon, indigis ĉies meriton kaj kun entuziasmaj vortoj esprimis la deziron por la revido dum la XVa en 1923. Ĉiu aplaudigis lin kaj la senlaca finnan fraton s-ron H. Salokannel, la lertan kaj eminentan sekretarion.

0000

PROTOKOLARO DE I. A. E. F.

Protokolo de la unua I. A. E. F. kunveno okazinta la 12. de novembro 1922 en Ĉ. Třebová je la 11—15a horo, kiun prezidis s-ro vicprez. Blažek (Olomouc). Programo: 1. Raportoj de I. A. E. F. komitatanoj kaj delegitoj. 2. Diskuto pri la fakrevuo, kiu tute ĉesis aperadi. 3. Financoj. 4. Redakciaj sciigoj. 5. Korespondajoj (ricevitaj letéroj, aliĝiloj k. t. p.). 6. Libera proponoj. 7. Dato de la venonta kunveno. La kunsidon ĉeestis jenaj s-roj: vicprez. Blažek (Olomouc), asesoro Ivanovič (Praha), kasisto Kubásek (Plzeň), delegito Malík (Přerov). Malfermante la kunsidon s-ro vicprez. post saluto de ĉiuj alvenintoj tralegis p. k. de f-ino S. Dlouhá, kiu senkulpigis sian neĉeeston kaj du leteroj de s-ro Marich, ĉefredaktoro de «La Policisto» (Budapeŝt). 2. S-ro Ivanovič plenumos la taskon enmanigi la skribe faritan ultimaton al nia eldonanto s-ro Adámek, kiun li estos devinta respondi ĝis la 20. de novembro; nerespondo estos rigardata kiel malakcepto de la decido, aŭ li ĝis la 20. de novembro eldonos la nove promesitan trian numeron de «Fervoja Esp.», alie ni ne plu reflektos je liaj servoj por ni, ĉar li nian organizon per sia malzorgo tre malutiligas. 3. S-ro kasisto prizorgos la traktadon koncerne la enkondukon de propra konto ĉe poŝtsparkaso en Praha. Ĉiu membro ricevos de s-ro kasisto la pagilon de poŝtsparkaso. Kasa stato de I. A. E. F. estas tute aktiva. 4. S-ro Ivanovič mem prizorgos la raportojn. Li ankaŭ bonvole prenis sur sin la taskon postuli kaj akiri la aŭdiencon ĉe s-ro fervojministro, por atentigi lin je la laboroj de aliaj eksterlandaj registaroj, precipe de finnaj, germanaj kaj hungaraj registaraj rondoj, kiuj treege subtenas la ĉiam kreskantan movadon de Esperanto en siaj landoj. 5. La korespondajoj estis preparolitaj kaj reciproke interŝanĝitaj. Ricevitajn aliĝilojn oni transdonis al s-ro Kubásek (kasisto), ĉar s-ro sekretario ne ĉeestis. 6. S-ro Blažek proponas la elektadon de pliaj fervoraj delegitoj, kiuj laborus por I. A. E. F. Due li proponas serĉi interrilatojn kun Nürnberga L. K. K. por trovi seriozajn fervojistojn en Nürnberg, kiuj estus kapablaj aranĝi fervojan fakkunsidon dum la XVa U. K. de E. en Nürnberg. 7. Antaŭ la fermo de kunsido estis decidite pri estonta komitata kunveno al Ĉ. Třebová aŭ al Choceň, se tiun ĉi povos ĉeesti s-ro Habelloĉk. Se ne, do denove en la sama loko dum la sama tempo. La kunvenon kunvokos s-ro vicprezidanto Blažek. (La 16an estis persone preparolitaj aferoj de I. A. E. F. inter s-ro Blažek kun s-ro Barviř en Olomouc. La sekretario proponis aŭ Ĉ. Třebová aŭ Choceň ĝis laŭ la esprimo de s-ro asesoro Habelloĉk, kiu al Choceň povas pli

facile alveturi.) Kun reciproka manpremo la kunvenintoj disiris kaj veturis hejmen. — Blažek, vicprezidanto.

Protokolo de la I. A. E. F. en Ĉ. Třebová la 17. decembron 1922. Komitatana kunveno de I. A. E. F., aranĝita la 17an de decembro 1922 en Ĉ. Třebová de la 11a ĝis 14a horo, estis reprezentita de tri s-roj komitatanoj (estis invititaj 9). Prezidis s-ro vicprez. Blažek (Olomouc), kiu tuj komence tralegis senkulpigan leteron de s-ro kasisto Kubásek, kiu ne povis ĉeesti pro urĝaj servaj laboroj. Li samtempe proponas presigi admonilon por sendi ĝin al la membroj ĝis nun ne pagintaj. Ĝia teksto aprobita estas jena: «Estimata. Por efektiviĝi la malfacilan taskon, per kiu oni konfidis nin, ni urĝe bezonas ne nur moralan helpon, sed ankaŭ monon. Pro tio ni insiste petas vin, sendu senprokraste la ŝuldatan sumeton. Bonvolu samtempe pagi al ni la kotizojn kaj enskribopagon por jaro 1922.... Mistifikitaj preskaŭ dum kvin monatoj de la posedanto de «Fervoja Esperantisto», kiu ne plenumis la interkonsentitan regulan eldonadon, ni petas, ke niaj anoj pacienciĝu ankoraŭ kelkajn semajnojn. Nia asocio venonte posedos oficialan revuon propran aŭ presitan alilande. (Bedaŭrinde, ankaŭ kun s-ro A. Marich el Budapeŝt, kun kiu mi longe traktadis, mi ne sukcesis fari kontrakton rilate eldonon de nia memstara bulteno faka. Tiurilate okazos defina decido dum la XV. en Nürnberg.) La revuo estas por ĉiu ano obligata.» — Programo: 1. Aferoj sekretariaj, redakciaj kaj financaj. 2. Proponoj. 3. Dato de la venonta kunveno. S-ro vicprez. tralegis la tutan korespondadon inter s-ro polica ĉefinspektoro Marich kaj I. A. E. F. rilate proponitan interkonsenton. Ĉar la kontrakto ne estas ankoraŭ ambaŭflanke subskribita, nenia decido povis intertempe okazi. Laŭ demando de U. E. A. estis decidite plikompletigi la anoncon de I. A. E. F. por jarlibro 1923. (1922 paĝo 66.) Respondo ĝin s-ro vicprez. Blažek ĝis la 31an de decembro 1922. Nia asesoro s-ro Habelloĉk sendas leteron kun 3 Mk germ. kiel reston de la abonpago de 3 anoj kaj piendas je malbona stato financa kaj ne ebleco korespondi. Alvenis ankoraŭ leteroj: el Vieno, kiun sendas s-ro Max Ullmann, Wien II., Taborstr. 41, kun saluto je la nomo de societo «Esp. Ferv.», Wien XIV., Westbahn Werkstätte, kun 40 kursanoj; el Belgio de s-ro A. de Baschere, 3, Place de la Regence, St. Nicolais, Waes, Belgique. — Financa stato kiel lastfoje, tute aktiva. Al s-ro Kubásek sukcesis gajni konton en ĉefia filio de Živnostenská banka en Plzeň, rilate nian enkasigon de niaj kotizoj. Gesamideanoj el Nürnberg respondis rilate la fakkunsidon de I. A. E. F. dum U. K. de E. 1923 (aŭgusto) ne definitive. S-ro ĉefkonsilanto Řebíček estis balote elektita kiel delegito de I. A. E. F. (pro malsano li ne akceptis). Venonta kunveno: La 21an de januaro 1923 en la sama loko. (Ĝi ne okazis.) — Blažek, vicprezidanto.

Protokolo farita en komitatana kunveno okazinta la 18an de marto 1923 en Praha, salono de atendejo de IIa klaso en stacidomo de Masaryk. S-ro prezidanto malfermante la kunvenon post la 10a horo antaŭtagmeze salutas ĉiujn kore kaj rimarkas, ke la hodiaŭa kunveno devas decidi pri la eldono de propra fakrevuo, ĉar oni ne povas plenumi la deziron de s-ro Marich, monkollekti 100 antaŭabonojn por la «La Policisto-Poŝtisto-Fervojo». Ĉeestis ges-roj: vicprez. Blažek J., kasisto Ku-

básek E., asesoro Ivanovič L., delegitoj: Dlouhá S., Kvapil A. kaj Urbanec K. Estis decidite, ke I. A. E. F. fondos memstaran revuon. Por tiu celo estis starigita komitato, kies laborojn gvidos nia asesoro s-ro Ivanovič kaj kiu kunvokos ankaŭ la estontan kunvenon por tiurilata findecido, plej malfrue post unu monato. Ĉar s-ro sekretario tute ne klopodis, spite urĝaj plendoj de diversaj novaj membroj, skribi kaj dissendi al la membroj iliajn membrokartojn, kiuj jam pagis la kotizaĵojn, estis decidite, ke s-ro kasisto daŭrigu de hodiaŭa tago la skribadon de asociaj legitimacioj. Tiurilate s-ro Kubásek estas rajtigita skribi al s-ro sekretario Barviř. Je la 12a horo tagmeze fermis la vicprez. la kunvenon dezirante plej bonan sukceson al la nove starigita komitato. — Blažek, vicprezidanto.

Protokolo de I. A. E. F. kunveno en Praha (stacidomo de Wilson) okazinta la 10an de junio je la 9a horo matene en salono de atendejo de Ma kl. kiun kunvokis s-ro vicprez., ĉar ne ekfaris tiel (laŭ la decido farita en lasta protokolita kunveno) s-ro Ivanovič. Ĉeestis gesinjoroj: Blažek J., Kubásek E., Dlouhá S., Malík A., Urbanec. Prezidis s-ro vicprez. Blažek, protokolis s-ro Malík. S-ro prezidanto malfermis la kunsidon (ne ĉeestis la invititaj s-roj J. Ivanovič kaj Barviř J.) precize je la starigita horo, kaj prezentis jenan programon: 1. Raportoj. 2. Fakrevuo. 3. Proponoj koncerne la programon por I. A. E. F. kunsido en Nürnberg dum la U. K. de E. 4. Partoprenontoj al la ĝenerala kunveno. Pro ne ĉeesto de I. A. E. F. sekretario legis protokolojn de la 17. decembro 1922 kaj de la 18. marto 1923 s-ro Malík; al la dua protokolo s-ro Kubásek aldonas, ke rilate la legitimaciojn, pri kiuj li skribis al s-ro sekr. Barviř, li ricevis respondon de sekr. per p. k., ke li ĉion sendos al s-ro kasisto tuj post la reveno de Venetia konferenco, al kiu li tiam sin preparis pro forvojaĝi, sed ĝis hodiaŭ li ne ricevis la promesitajn preskorespondaĵojn, rilatantajn nian matrikulon. Pro tio s-ro kasisto komencis jam mem pretigi kaj dissendi la membrokartojn. Al tiu ĉi protokolo aldonas s-ro vicprez.: Kvankam mi interrompis — laŭ la supre dirita decido — la korespondadon kun s-ro Marich (kor. n-o 80) de post la 7. de marto 1923, mi do ricevis tuj la sekvantan tagon, t. e. la 20. de marto novan 4—6. (10—12.) numeron de «La Policisto». Mi ne scias, ĉu ĉiuj niaj membroj ricevis tiun ĉi lastan numeron, sed rimarkinda ĝi estas pro tio, ke ĝi enhavas niajn statutojn. Nature ankaŭ aliajn interesajn sciigojn ĝi enhavas por ni, ĉar s-ro Marich ricevis sufiĉe da materialo asocia dum la longa reciproka interrilato kaj korespondado. Certe li ne rajtas ĝis nun oficiale paroli por I. A. E. F. aŭ sen nia scio publikigi oficialajn sciigojn pri la I. A. E. F. en sia organo «La Policisto». Mi ne plu respondis al li. Tion mi volis rimarki, por ke ĉiuj geĉeestantoj eksciis precize la situacion. Kun s-ro Kubásek mi interŝanĝis kelkajn leterojn aŭ p. k., ankaŭ al s-ro Ivanovič mi skribis p. k. rilate la lasta numero de «La Policisto». Kun s-ro Barviř mi ĉesis interkorespondi, ĉar li principe miajn p. k. aŭ leterojn eĉ rekomenditajn ne respondas. Al s-ro Bontemps, nia prezidanto, mi du foje skribis. La unuan fojon, kiam mi revenis hejmen el Helsinko kaj anoncis al li lian elekton kiel nia prezidanto, la duan fojon mi sendis al li «Demandilon» kun demando, kion oni deziras aŭ proponas rilate nian organizon. Al

la unua letero li respondis, ke li ne povas labori por I. A. E. F. en jaro 1923, ĉar li estas tre okupita per konstruado de nova propra domo. Ankoraŭ estis menciite, ke mi forsendis (laŭ komitatana decido) antaŭ la kristnasko 1922 la anoncon por la «Oficiala jarlibro de U. E. A. 1923» rilate kompletigita I. A. E. F. komitato, t. e. la adresojn de nove en Helsinko elektitaj s-roj komitatanoj kaj asesoroj, petante la U. E. A. estraron pri afabla publikigo de tiu ĉi dataro inter la «Fakaj societoj». Ĉar neniu deziris vorton al tralegitaj protokoloj, oni alpaŝis tuj al la supre skizita programo. — Al la 1a punkto s-ro kasisto sin turnas kun senkulpiga deziro pardoni al li detalan prezenton de kasa stato pro forgeso de la kaslibro en sia loĝejo; tamen li prezentas laŭ ĉe si havitaj notoj la nunan kasan staton, kiu estas tute aktiva en sumo de Kĉ 1500 — kaj samtempe li prezentas la budĝeton por eventuala eidonado de propre redaktota kaj eidonota fakrevuo. Krom tio li ankaŭ postulas, ke ĉiu postulo da mono el I. A. E. F. kaso estu per elspezkalkulo konfirmata. S-ro vicprez. sciigas, ke li posedis komence de jaro 1922/23 je asocia mono Kĉ 193.40 kaj enspezis ĝis hodiaŭ ankoraŭ Kĉ 89.04, t. e. en sumo Kĉ 282.44, el kiuj li parte elspezis (afranko), parte transdonis al s-ro sekretario J. Barviř kaj al kasisto E. Kubásek, entute Kĉ 216.04; la en Helsinko kolektitajn 250 Mk finnajn li transdonis neŝanĝite (en Kutná Hora la 9. okt. 1922) al nia asocia kasisto. Nune li posedas ankoraŭ Kĉ 66.40 (por afranko ktp.). — Rilate al punkto 2a estis decidite, ke I. A. E. F. el siaj ĝisnunaj enspezoj eldonos sian propran dumonate aperontan revuon, kies redaktoro estis elektita s-ro vicprez. Blažek, kiel responda redaktoro s-ro kasisto Kubásek, kiu samtempe prizorgados la regulan presadon de la fakrevuo en lia loĝurbo Plzeň, de kie ĝi estos al ĉiu I. A. E. F. membro ekspedata. Tiurilatajn konsilojn ankaŭ vigle partoprenis gesamideanaj I. A. E. F. delegitoj ĉi-ino S. Dlouhá kaj s-ro insp. J. Urbanec, eĉ nia protokolisto s-ro A. Malík. Ĉiuj manuskriptoj estu adresataj al s-ro J. Blažek; ĉiuj mensendaĵoj al s-ro Kubásek. Ĉar la I. A. E. F. en nuna jaro 1922/1923 verŝajne ne sukcesos eldoni pli ol unu aŭ du numerojn de nia fakrevuo, estis decidite, ke oni redonu la de s-roj J. Blažek (Olomouc) kaj A. Malík (Přerov) kolektitajn tiurilatajn abonpagojn. Al la 3a punkto s-ro Kubásek proponas: 1. Elekti en la estonta ĝenerala kunveno 2 aŭ 3 revisorojn, kies devoj kaj rajtoj estos revizi la asocian kason (monposedaĵojn) kaj raportoj tiurilate en ĝenerala kunveno, eventuale doni al la konferencanoj necesajn proponojn aŭ konsilojn koncerne organizon aŭ asocian financadon. 2. propono de s-ro Blažek: Se I. A. E. F. aliĝos al «La Policisto» kiel memstara buĝeno, oni proponas ŝanĝi la titolon de la gazeto (revuo), t. e. anstataŭ «La Policisto» oni nomu la gazeton «Ligo de la Ordo» — oficiala internacia organo de «La Policisto, La Fervojoisto, La Poŝtisto, La Skolto, La Maristo,» (ev. alfabeto) ktp. Antaŭ la fermo de komitatana kunsido vizitis je unu momento vigle laborantajn gekunvenintojn la asesoro s-ro Ivanovič, kiu senkulpigis sin, ke li ne povas ĉeesti la kunvenon, ĉar li devas akompani sian malsanan edzinon kaj li certigis nin per sia simpatio rilate ĉiuj niaj entreprenoj kaj laboroj. Kun bondeziro al nia inda sukceso kaj kun espero je pli fruktodona estonteco fermis s-ro vicprez. la kunvenon je la 12.30 horo tagmeze kaj ĉiuj, kontentigitaj per faritaj decidoj, disveturis kun vortoj

»Je la revido en Nürnberg« en siajn hejmojn. — Blažek, vicprezidanto.

Salutparolo de ekssekretario s-ro Blažek al gekongresanoj de XIVa U. K. de E. en Helsinko en la 2a laborkunsido de la kongreso okazinta sabate la 12. de aŭgusto 1922 antaŭtagmeze en la Nobelara domo. »Karaj geamikoj! Kiel sekretario de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj mi havas grandan honoron kaj plezuron tutkore saluti vin ĉiujn, kiuj partoprenas la Universalan kongreson de Esperanto en la bela, gastema ĉefurbo de Finnlanda Respubliko. Samtempe mi bonvenigas ĉiulandajn gefervojistojn kaj petas insiste: Ne prokrastu pli vian aliĝon al la refondita I. A. E. F. En la pasinta jaro, t. e. en la nuna jaro aliĝis al la nomita asocio pli ol 240 aktivaj membroj plej parte ĉeĥoslovakaj gefervojistoj. La komitato intencas kaj jam komencis eidi internacian fakrevuon »La Fervoja Esperantisto«. Pro graveco de la entrepreno ni bezonas membrojn pli multnombrajn, precipe viglajn, fervorajn kunlaborantojn. Ankaŭ ĉiulandaj esperantistaj eĉ neesperantistaj societoj kaj entreprenoj povas aliĝi, fariĝi membroj subtenantoj. Nia fak-kunsido okazos hodiaŭ sabate la 12. de aŭgusto je la 3a horo posttagmeze en Artpalaco, ĉambro 3. Al la estimataj gesinjoroj aranĝantoj de la XIVa, al la kongresaj laboroj, mi sincere deziras plej bonan sukceson.«

La protokolo larita en la dua ĉefkunsido de I. A. E. F. en la stacidomo de Helsinko la 14. de aŭgusto 1922. Funkciantoj: prezidanto J. Blažek, sekretario H. Salokannel. Oni petas, kiel eble plej multajn kolegojn, kunlabori kun s-ro Habellok en verkado de la fakterminaro. Ĉar ne ekzistas ekz. respondaj oficoj en ĉiu lando, ĝi devas esti verkata en sama maniero kiel la »Vortaro de Esperanto« de Kabe, sekve kun precizaj vortklarigoj. La prezidanto komunikas, ke estis invititaj al niaj kunsidoj la estraroj de U. E. A. kaj de Centra oficejo, t. e. nuna Konstanta reprezentantaro kaj ke la ĝenerala sekretario s-ro R. Jakob eĉ persone promesis ĉeesti, sed ke nek li nek iu alia s-ro el U. E. A. aŭ K. r., certe nur pro aliaj urĝaj kunsidoj kaj kongresaj laboroj, povis ĉeesti. En I. A. E. F. estas nun organizitaj 243 anoj: El Finnlando 8, Ĉeĥoslovakujo 169, Aŭstrio 7, Italio 26, Britio 1, Francujo 2, Belgujo 2, Nederlando 3, Germanujo 16, Polujo 2, Estonujo 2, Svedujo 2, Hungarujo 1, Jugoslavio 1 kaj el Rusujo 1. En la konferenco estis decidite, ĉiujn al la kasisto s-ro Kubásek senditajn abonpagojn transdoni, elpigi al nia gazeteldonanto s-ro O. Adámek. (Red. rim. Tio okazis; s-ro Kubásek elpasis en la jaro 1922 al s-ro Adámek 880 Kč). Je fermo de la lunda kunsido (2a) s-ro Blažek kore dankas al ĉiuj partoprenintoj pro fervora kunlaboro dum nia konferencado en Helsinko kaj aldonas, ke ni ĉiuj ŝuldas sinceran dankon precipe al la provizora fervoja Loka Komitato, unuavice al s-roj H. Salokannel, Lilquist, Veijola kaj ĉiuj aliaj kunaranĝantoj, ĉar ili kun vera amikeco kaj gastameco ĉiam kompleze nin fremdlandanojn akompanis, ĉiurilate nin helpis kaj tiamaniere ili plifaciligis kaj pliagrabiligis al ni la restadon en la kongresa belaspekta ĉefurbo de Finnlanda Respubliko. Dezirante al ĉiuj konferencanoj plej bonan sanon dum la reveturo al la hejmo kaj por la estonta jaro, esprimas la prezidanto la esperon, ke ni certe ankoraŭ plimultenombre nin revidos dum la XVa U. K. de Esperanto en la jaro 1923. S-ro Salokannel tutkore dankas la partoprenantojn

en la nomo de Finnoj, bonvenigas ankaŭ por estonte veni en lian landon kaj disdonas 1145 finnajn mk. kiel subtenon al la eksterlandaj reprezentantoj, dezirante, ke la fremdlandanoj afable esprimu koran saluton al la hejmolandaj samfakanoj, kiuj ne povis partopreni la konferencon. La bonsukcesinta kunsido estis finita. La partoprenintoj estis poste fotografitaj.

El la protokolo pri nia gen. kunsido faka en Helsinko. La prezidanto s-ro Blažek antaŭ fermo de la lasta konferenco esprimas jenon: »Estimataj! Kiel vi scias, ekzistas la »Lingva komitato« kiel nia centra organizaĵo por lingvaj aferoj. Sed ne estas eble, ke ĝi sola povu konstrui ĉiufakajn terminojn. Tiamaniere ankaŭ nia asocio vigle komencis labori rilate tiun ĉi programpunkton, kaj estas nia laborema samfakano, s-ro inspektoro G. Habellok el Breslaŭ, kiu pacience prenis sur sin la taskon gvidi la koncernantajn laborojn. Certe li meritas nian sinceran dankon, kaj estas devo, ke ni ĉiuj tuj ekomencu serioze helpi kaj subteni lin en lia grava, malfacila entrepreno. (Rim. red. Komprenoble, pro nuntempaj valutaj malfacilaĵoj nia asesoro s-ro G. Habellok povas respondi aŭ korespondadi kun eksterlandaj samfakanoj nur tiam, se ili almetas respondkuponon.)

* * *

Karaj geamikoj! Venu ĉiuj al Nürnberg la 2an de aŭgusto 1923. Tie vi ekscios, kie kaj je kioma horo ni kunvenos. De niaj membroj dependas, ĉu ni pli intense daŭrigos niajn laborojn fakajn kaj ĉu ni ekkonatiĝos per amikaj, informaj, reciprokaj interrilatoj, tio estas, ĉu ni finaprobos kaj plenumos nian programon. Ĉiu aliĝinta lando, ankaŭ tiuj, kiuj ne posedas ĝis nun elektitan asesoron, devas sendi minimume 3 reprezentantojn (delegitojn), kiuj havos la rajton voĉdoni pri ĉiuj programpunktoj pri diskutotaj. — Blažek, vicprezidanto, redaktoro de »La Fervojisto«.

oooo

DIVERSAĴOJ.

Fako por korespondado.

Leteroj, p. k., gazetoj, broŝuroj ktp., ricevataj de nia vicprezidanto, kiu danke tion jene konfirmas:

1. »**Informa Bulteno**« n-oj 3 kaj 5/1 de la Barcelona Esperanto societo (B. E. S.).

2. »**France-Esperanto**« (marto 1922), monata organo de francaj Esperantistoj kun informa anonco pri I. A. E. F.

3. »**Pola Esperantisto**«, monata gazeto de polaj Esperantistoj, jaro XVII., n-o 3 (89), en Warszawa, Nowogrodzka 17.

4. »**Export Esperantist**«, Chicago, Illinois, oktobro 1922, volumo 2, n-o 10 (2 ekzempleroj).

5. »**La Tribuna dei Ferrovieri**«, jaro XVI., n-o 315 (februaro 1922). Red. kaj adm.: Bologna, Via Marghera n-o 1., dankas por tiu alsendo al Esperanta Fervojista Unuiĝo, Torino.

6. Foirofoicejo por la specimenfoiroj en (Messamt für die Mustermessen in) Leipzig, kiu akceptas la aliĝilon por la Leipziga Printempa Foiro (en marto) kaj por la Aŭtuna Foiro (en aŭgusto).

7. Similan bele ilustritan broŝuron alsendis la Direkcio de Finnlanda Foiro, Helsingfors, Finnlando-Suomi.

8. Letero de s-ro Jean Valette, elektra desegnisto, 19, Rue Bialar (Minimes), Toulouse-Francujo

(Haute-Garonne); respondo: Bonvolu pagi la kotizon, enskribopagon kaj jarabonon al s-ro E. Kubásek.

9. Letero, ricevita la 16an XII. 1922 (kun bela fotografajo de Xla Belga Esperanto Kongreso St. Nikolas 4—5. junio 1922) de Universala Esperanto Asocio, A. de Boschere, Place de la Regence 3, St. Nikolaas (Waes), Belgique, kiu sciigas, ke li baldaŭ aranĝos paroladon kaj esp. kurson al la loka sekcio de fervojistoj, poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj kaj maristoj kaj tial li deziras alsendon iom da novaj sciigoj aŭ gazetoj ktp. dokumentoj pri nia movado.

10. Poŝtkarto kun dato de 15. XII. 1922 de s-ro Max Ullmann, Wien II., Taborstrasse 41., per kiu li sciigas, ke li legis pri I. A. E. F. en la oficiala jarlibro de UEA 1922, paĝo 66, ke li gvidas kurson kun 40 partoprenantaj fervojistoj, ke ili deziras fondi societeton (grupon) fervojistan, tial li deziras modelon de niaj statutoj, nomaron de eksterlandaj fervojistoj kaj aliĝon al I. A. E. F. Certe oni ŝatas tiajn fervorajn entreprenojn, kiuj unuavice koncernas I. A. E. F. Tiurilate mi proponas aŭ rekomendas: Plejbone tuj aliĝi al la I. A. E. F. kaj aboni nian fakrevuon «La Fervojisto».

11. S-ro Aüg. Sonne — letere 26. I. 1923 — alsendis 2 aliĝilojn plenigitajn (Sonne kaj Püttzapp) kun 2 respondkuponoj, kotizon: 2.5 fr. fr. × 2 = 5 fr. fr., kiujn mi transdonis al s-ro Kubásek.

12. Maria Rolla Braga & Ismael Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilio, sciigas al ni la naskiĝon de sia filo Lauro Zamenhof. Ni kore gratulas.

Ricevita korespondajo de nia kasisto:

1. Cirkulero al ĉiuj oficejoj n-o 411/I. 1921, kun dato de 10. septembro 1921 de fervoja direkcio en Plzeň, en kiu oni povas inter alie legi jenon: «... La ministerio por fervojaj aferoj de ĉeĥoslovaka respubliko en la ordono n-o 45959/pres./I. de 30. aŭgusto 1921 konstatis, ke la fervojistaro en kelkaj direkciaj distriktoj el propra iniciativo kaj diligentemo ekposedis konon de internacia lingvo «Esperanto» tiom, ke ili nun povas kun traventuranta fremda vojaĝantaro, konata esperanton, en tiu ĉi lingvo bone interkompreniĝi. Ke ĉi tiu penado ne restis senrezulta montriĝis plej bone dum la XIII. Universala Kongreso de Esperanto en Praha. Rekomendu do al tiuj fervojistoj, kiuj laŭ sia deĵora programo estas devigataj interrilatiĝi kun la eksterlandanoj, ke ili dediĉu al la lernado de Esperanto laŭdecan atentemon kaj okaze de okupado de la koncernaj oficejoj, rigardu ankaŭ la konon de tiu ĉi lingvo internacia...»

2. S-ro Jakob Hechtl, München, Siegfriedstr. 18/3., de la januaro 1921, tre fervora kaj bona esperantisto, aŭtoro de belega Esperanto-monumento en Františkovy Lázně (Franzensbad), Ĉeĥoslovakio, skribis al nia kasisto inter alio: «... Almetite mi transsendas al Vi 50 germ. mk. por 10 membroj, t. e. por mi kaj naŭ aliaj membroj, ties nomoj mi momente ne scias, mi esperas baldaŭ pluajn naŭ membroj gajni, kaj skribos al Vi tiujn ĉi nomojn. Sendu al mi aliĝilojn. Eventuale sciigu tion al la prezidanto Habelok okaze kaj diru al li, ke li sendu al mi aliĝilojn por germana fervoja societo, mi ne scias plu, kiom estas la kotizajo por tiu ĉi asocio kiu kaj sen gazeto, eble mi povas gajni kelkajn membrojn por tiu ĉi societo. — Tia fervoja konsilanto s-ro F. ŝuldas al mi 53.45 germ. markojn; kial donaci tiun monon al neesperantisto,

pli volonte mi tiun sumon dediĉos por Esperanto. Tial enkasigu kvindek tri kaj 45/100 da germ. mk. de tiu s-ro F. kaj deponu ĝin ĉ. Vi ĝis la tempo, kiam mi pri ĝi definitive decidus. — Kiel fartas la fervojistaro en via lando kaj precipe la ĝenerala movado esperantista entute? Ĉe ni en Bavarujo, ni fartas ne tro bone, sed ankaŭ ne tro malbone. Ni ne havas plu ĉe ni ian gravan kontraŭulon, kiel ni iam havis, sed alvarbi serioze lernantajn kaj laborantajn esperantistojn oni proporcie ne sukcesas multon trovi. Dum la lasta jaro mi tre intense laboras por Esperanto inter la fervojistoj; ĉiusemajne mi gvidas por ili 2 kursoj, kiujn partoprenas 50 personoj de fervojistoj el malsupraj klasoj. Plej malfacile estas propagandi Esperanton inter mezaj klasoj de fervoja oficistaro. Pli da kompreno kaj intereso havas por ĝi la superaj oficistoj. Ekzemple ŝtata sekretario, prezidanto de la bavara fervoja ministerio s-ro de Frank, kiu eksterordinare interesas sin pri Esperanto. Li estas pri utileco de Esperanto ĉe la fervojoj tiom konvinkita, ke li en ĉiu okazo instigas min, ne cedi kaj admonas min, ke mi daŭrigu persiste propagandi nian noblan ideon kaj lingvon internacian Esperanto. Li certigas min, ke li per sia tuta forto subtenados nin, por ke ni atingu nian celon. — Ĉu Vi ne povas en Ĉeĥoslovakujo ekinteresi la ceterajn esper. korporaciojn, ke oni faru al la ministerio por fervojaj aferoj proponon, ke oni korespondadu kun bavara ministerio en Esperanto? Mi forte kredas, ke la bavara fervoja ministerio tiun proponon akceptos. Se ni eble ne tuj sukcesus tion atingi, restus almenaŭ bona reklamo por nia afero kaj samtempe plifaciligus la esper. pozicion kiel al mi, tiel ankaŭ al s-ro ŝtata sekretario, kiam la s-roj referentoj fine legus, ke Esperanto en aliaj gravaj ŝtatoj tiom multe progresis, ĉar ĝis nuna tempo tiuj sinjoroj tion ne volas kredi. Ĉiam de tempo al tempo al tiuj oficejoj sendadi interpelaciojn en Esperanto. Tio estas la plej efika propaganda rimedo...» (Daŭrige.)

Esperanto-movado en Pŕerov. Antaŭ unu jaro oni eĉ ne sciis pri la Esp. movado en Pŕerov. La tutan movadon disvolvis preskaŭ unu homo, la nuna prezidanto de la societo s-ro Malšk. Li aranĝis propagandan paroladon kaj post ĝi la Esp. kurson. Antaŭ la nova jaro oni komencis jam la duan E. kurson kaj fondis dumtempe neoficialan E. rondeton. De aprilo de tiu ĉi jaro ekzistas jam oficiala E. societo. La nomita societo havis en aprilo sian unuan ĝeneralan kunvenon, kiun ĉeestis 50 personoj. Nune havas jam la societo 60 anojn. Por aŭtuno preparas la E. societo en Pŕerov grandan propagandan feston kunigitan samtempe kun reala ekspozicio de Esp.-aĵoj. Ĉar la nomita societo ne havas tiom da materialo, petas E. societojn, ke ili helpu en ĉia malfacila tasko per afable prunto aŭ donaco de Esp.-aĵoj, ekzemple: Libroj, gazetoj, lerno- kaj legolibroj, gvidlibroj, broŝuroj, katalogoj, kantaroj, ilustritaj revuoj, presaĵoj, diversaj kolektoj, fotografajoj, diversnaciaj kostumbildoj, brodaĵoj, kongresafiŝoj, poŝtkartoj, poŝtmarkkolektoj, propagandiloj, glumarkoj, propagandiloj de internaciaj sneclmon-foiroidoj, publikajoj de ĉiuj fakoj ktp. La afable pruntitaj Esp.-aĵoj estos post fermo de la ekspozicio kun kora danko de E. societo en Pŕerov al pruntintoj en sendifekta stato resendataj. Esperantaj estu afable direktataj al la sekretario: Eduard Zatloukal, Pŕerov, Ĉeĥova n-o 10, Ĉeĥoslovakio. Pruntajoj estu notitaj per signo P, eventualaj donacoj per signo D.

NOMARO

DE LA ANOJ DE I. A. E. F.

(De 1 ĝis 183 vidu »Fervoja Esperantisto« 1922, n-oj 1—2.)

184. **Josef Vondra**, oficisto, Bratislava, departm. II.
 185. **Alois Schier**, ĉefrevidento, Bratislava, Bathyany nábřeží čis. 12.
 186. **Fernando La Graviere**, oficisto, Anvers, Rue de l' Arc n-o II, Belgujo
 187. **Quido Benetti**, maŝinisto, Mantova, Vicolo Agnelli n-o 3, Italio.
 188. **Ettore Burci**, vagonarestro, Mantova, Via Anselmo G. Guerieri n-o 17, Italio.
 189. **Giuseppe Gadalora**, maŝinisto, Mantova, Vicolo Trutta n-o 1, Italio.
 190. **Giovani Einelli**, fervojisto, Mantova, Corado 21.
 191. **Qulo Ferri**, vagonarestro, Mantova, Sacchi n-o 6.
 192. **Benedetto Quidetti**, vagonarestro, Mantova, Domenico Fernelli n-o 1.
 193. **Ernesto Quidetti**, vagonarestro, Mantova, Corso Vitt. Emanuele n-o 30, Italio.
 194. **Etoze Zanibani**, maŝinisto, Mantova, Magistretto n-o 8.
 195. **Romeo Rola**, maŝinisto, Mantova, C. Roma n-o 18.
 196. **S. Hodges, Wealdstone**, 96 Herga Road, Middlesex, Anglio.
 197. **Karl Mösslinger**, ĉefkonduktoro, Zatec, Stacidomo 1023.
 198. **Jean Valette**, elektra desegnisto, Toulouse, Rue Bialard n-o 10, Minimes-Francio.
 199. **Josef Hrdlička**, oficisto, Nové Sedlo u Lokte, Ĉeĥoslovakujo.
 200. **Caspard Blause**, oficisto, Dison, Neuve 54, Belgio.
 201. **Albert Sander**, fervojisto, Ústí n. L., Maternipl. n-o 2.
 202. **Giuseppe Quarone**, fervojisto, Voghera apud Pavia, Corso 27. Marzo n-o 49, Italio.
 203. **Kurt Ostermann**, oficisto, Gera Reuss, Blücherstrasse n-o 55/II., Thüringen, Germ.
 204. **Aŭgust Richter**, oficialo, Falkenaŭ a/Eger, Schönauthal, n-o 10, Ĉeĥoslovakujo.
 205. **A. Pelder**, ĉefkonduktoro, Leiden, Rijn en Schikade, Nederlando.
 206. **Rudolf Costa Rosetti**, inspektoro, Wien III., Blütengasse n-o 7, Aŭstrio.
 207. **Theodor Engel**, oficisto, Wien, Grossestadtgutgasse n-o 34.
 208. **Franz Kühnel**, inspektoro, Wien, Lassallestr. 36/II.-14.
 209. **Fridrich Pitter**, inspektoro, Wien II., Mühl-Feldgasse n-o 15.
 210. **Hugo Steiner**, insp., Wien II., Korneuburg.
 211. **Eduard Zoubek**, insp., Wien V., Stolberggasse n-o 21/44.
 212. **Angelo Colombo**, oficisto, Voghera apud Pavia, Via del Fassato, Italio.
 213. **Giuseppe Cotti**, oficisto, Voghera, Via del Verne n-o 14.
 214. **Orfeo Ferri**, oficisto, Voghera, Via Ponte Vecchio.
 215. **Jaromír Ivanovič**, ĉefrevidento, Praha II., »Pod Slovany« č. 11.
 216. **Josef Richter**, oficialo, Cheb (Eger), Pograthstr. n-o 66.
 217. **Giulio Galice**, maŝinisto, Mantova, D. Fernelli n-o 24.
 218. **Ugo Albertazzi**, vagonarestro, Mantova, Achille-Sacchi 18.
 219. **Miroslav Rumpal**, ekspedisto, Osablaha, Silezio.
 220. **Antonin Pavel**, lokomotivestro, Krochovice u Podmokly.
 221. **Jan Haase**, oficisto, Horní Růžodol u Liberce, Měst. ul. č. 72.
 222. **Josef Řehák**, staciestro, Hodkovice nádraží, v Čechách.
 223. **Josef Friedrich**, komisař v Košicích, ředitelství st. drah, odd. II.
 224. **Josef Hofmann**, inspektor, Plzeň, Klatovská tř. č. 26.
 225. **Salokannel H.**, librotenisto, Laihia, Suomi-Finlando.
 226. **S. Veijola**, librotenisto, Helsinki, Menev. Lav., Finnlando.
 227. **František Dvořák**, vagonarestro, Trutnov, Kostelní ul. č. 21.
 228. **Leo Dittrich**, fervojisto, Trutnov, Spinnerstr. n-o 6.
 229. **Jaroslav Janák**, oficisto, Trutnov, Stacidomo.
 230. **Cyril Novák**, oficisto, Lázně Bělohrad, náměstí 32.
 231. **Emamel Hentsch**, Blockwächter, Meierhöfen b. Karlsbad.
 232. **Josef Barviř**, fervoja konsilanto, Brno, fervoja direkcio dep. II.
 233. **Georg Bontemps**, Colombes (Seine), 4, Villa de Cerises, Francio.
 234. **Šešelj**, adjunkt, Mostar, Jugoslavio.
 235. **Christian Schneider**, lokomotivestro, Leutkirch in Allgäu, Memingerstr. 310, Württemberg.
 236. **Aŭgusto Sõmo**, oficisto, Tallin Rand, Valitsas, Svedujo.
 237. **Aŭgusto Püttsepp**, oficisto, Tall. Rand, Valitsas, Svedujo.
 238. **Mihaelo Valentinov**, Moskvo, Ĉudovskoj ser. 116, Rusujo.
 239. **T. A. Linberg**, oficisto, Parola, Finnlando.
 240. **Honoratus Bonevie**, oficisto, Kristiania, Norvegujo.
 241. **Hj. Lillgissl**, oficisto, Helsinki, Suomi, Finnlando.
 242. **Aron Salomen**, telegrafisto, Salo, Finnlando.
 243. **S. Sankkonen**, S. N. E. staciestro, Rajajoki, Suomi, Finnlando.
 244. **Karel Kluger**, vagonarestro, Přerov, Škodu- ul. č. 15.
 245. **Josef Smetana**, lokomotivestro, Lužná Lišany.
 246. **Josef Krátký**, manipulanto, Trutnov, Polní ulice č. 11.
 247. **Emil Klase**, kontorhelpanto, Osoblaha, Silezio.
 248. **Luise Martin**, Villeneuve-Saint Georges, Francujo.
 249. **Josef Šilhart**, trajnrevizoro, Nymburk, Ĉeĥoslovakio.
 250. **Icumu Micuši**, meĥanisto, Tokio, fervoja direkcio, Japanujo.
 251. **Martin Bartovský**, staciestro, Postoloprty, Ĉeĥoslovakujo.
 252. **Alfredo Santoni**, fervoja sekretario, Torino, Italio.
 253. **Ladislav Krul**, oficisto, Zatec, Töpfergasse 842.
 254. **Jakob Hechtl**, fervoja sekretario, München, Siegfriedstr. 18/3.

- 255. **Oskar Schlicht**, oficisto, Nürnberg, loĝas en Roth, Hipoltsteinerstr. 363.
- 256. **Ermano Filipi**, oficisto, Roma, Italio.
- 257. **Lucien Lespiciér**, oficisto, Villeneuve-Saint Georges, Francujo.
- 258. **Julius Jech**, vagonarkondukanto, Osoblaha, Silezio.
- 259. **František Panák**, fervojisto, Malé Prosenice.
- 260. **Sedláček Frant.**, ĉefofic., Prostějov, Svatoplukova 70.
- 261. **Darhne O.**, Lundavogen 20, Västerås, Svedio. (Daŭrigo en sekvanta numero.)

Zorgu, ke la proksima numero de «La Fervojisto» povu enteni tri centojn da novaj membroj!

FERVOJISTOJ!

Sendu al la redaktoro s-ro Josef Blažek, en Olomouc, Müllerova 24 (Ĉeĥoslovakujo) raportojn pri esperanta movado en via loko, pri agemo de esperantistaj societoj, kluboj, rondetoj kaj pri fervojaj aferoj. Pliriĉigu la enhavon de nia gazeto per via kunlaboro, verkante originale aŭ tradukante artikolojn. Rekomendu ĉe nia konatara nian asocion, sendu al ni adresojn de tiuj, pri kiuj vi opinias, ke ili aliĝus al nia I. A. E. F. Nepagotaj artikoloj estas dankeme akceptataj.

Se ĉiu nia membro sukcesos tuj gajni almenaŭ 2 novajn membrojn, tiam facila estos nia plua laboro, nia tiurilata decido en Nürnberga ĝenerala fakkunsido.

KIEL SENDI MONON AL NI?

Esperantistoj el Ĉeĥoslovakujo pagu al ni ekskluzive per pagilo de poŝta ĉekoficejo (platenka poŝtovniho úřadu šekového, Erlagschein der Postsparkassa). Se vi ĝin ne havas, petu ĝin ĉe ni per poŝtkarto! Esperantistoj el ceteraj landoj pagu al ni per respondkuponoj, aŭ per papermono en rekomendita letero, sed ekskluzive en valuto montrita per ilia lando en nia tabelo de kotizajoj. Se vi ne intencas resti membro de nia asocio, bonvolu afable resendi ĉi tiun numeron «La Fervojisto» kun la sciigo, ke vi eksigas; se vi restos ĉe I. A. E. F., do sendu tuj la kotizajon por la jaro 1923—1924.

Redakcio kaj administracio.

ANONCETOJ.

Prezroj: Unu linio kostas 3 Kĉ. Vi povas sendi letere banknotojn. Por dekdu sinsekvaj publikigoj 20% rabato. Dike presitan linion oni kalkulas kiel du liniojn.

Kolegoj, kolektu anoncojn por nia gazeto!
Postulu informojn ĉe nia administracio.

KORESPONDADO.

Prezroj: Unu enskribo dulinia kostas 4 Kĉ. Vi povas sendi letere banknotojn. Por dekdu sinsekvaj publikigoj 20% rabato.

Mallongigoj: PK = poŝtkartoj. PI = ilustritaj poŝtkartoj. L = leteroj. PM = poŝtmarkoj. BFL = poŝtmarko sur bildflanko. KĉL = kun ĉiuj landoj. EA = esperantaĵo. EG = esper. gazetoj.

Ĉiu korespondanto (anoncanto) havas moralan devon almenaŭ unufoje respondi.

SOMERA RESTADO.

En tiu ĉi rubriko ni publikigas la nomojn de la personoj, kiuj volas sian libertempon pasigi ĉe ali-landaj samideanoj rekompence por restado de ĉi tiuj ĉe ilia familio.

oooo

INTERNACIA ASOCIO DE LA ESPERANTISTOJ FERVOJISTOJ.

Por nove alvarbita membro (aliĝanto).

ALIĜILO

Skribu legeble!

- | | | |
|-------------------|---|--------------------------------|
| en esper-
anto | } | 1. Familia nomo |
| | | 2. Antaŭnomo |
| | | 3. Profesio |
| | | 4. Ofica loko |
| | | 5. Gepatra lingvo |
| | | 6. Nacieco |
| | | 7. Strato kaj numero |
| | | 8. Urbo |
| | | 9. Provinco |
| | | 10. Lando (ŝtato) |

Morala devo de ĉiu nia ano estas, ke li alvarbu almenaŭ unu novan membron!

Novaj membroj (aliĝantoj) pagas kotizon kun abono por «La Fervojisto» (kiu estas al ĉiu membro de I. A. E. F. sendata senpage) 18 Kĉ por Ĉeĥoslovakujo; 18 lirojn por Italujo; 7 frankojn svis. por Svisujo; 14 francajn frankojn por Francujo kaj Belgujo; 7 ŝilingojn por Anglujo; 4 dolarojn por Amerikanoj; 7 jenojn por Japanujo kaj la ceteraj landoj pagas 7 svisajn frankojn. Sole por Germanujo, Aŭstrio, Magiarujo, Polujo, Rusujo oni fiksis la kotizon (kun abonpago) je 2 svisaj frankoj.

Ĉiu ano de I. A. E. F. ricevas senpage «La Fervojisto».

Sendu vian aliĝilon kun la mono al la kasisto E. Kubásek. La membrokarto (legitimacio) estos poste tuj forsendita al via adreso. Ĉiuj demandoj, deziroj, artikoloj ktp. de aliĝintaj membroj, rilatantaj nian organizadon, niajn interesojn, estos pri-traktataj senpage en nia fakrevuo «La Fervojisto». Manuskriptojn ricevas vicprez. J. Blažek, mendsaĵojn kasisto E. Kubásek. Se vi deziras specialan respondon, bonvolu aldoni ĉiam 2 respondkuponojn aŭ necesan aŭfrankon en neuzitaj poŝtmarkoj.

Ĉiulandaj samakanoj, grupoj, kie ne ekzistas elektitaj asesoroj, elektu tuj viglajn «perant-delegitojn» (asesorojn oni povas elekti nur en la ĝenerala kunsido [statutoj]), kiuj garantios, ke ili fervore prizorgos la organiz. laborojn kaj kolektados afable la monon kaj forsendos ĝin samtempe kun tiurilata nomarlisto, akompanata de koncerna plenigitaj aliĝiloj al nia kasisto s-ro E. Kubásek.

S-roj asesoroj (delegitoj) faros antaŭzorgeme, t. e. ili deskribos antaŭ forsendo de nomarlistoj la persondataron, ĉar povos iam okazi, ke la letero kun la «Aliĝiloj» dumvoje povus perdiĝi.

La persondataron de tiurilate elektitaj perant-delegitoj oni bonvolu tuj anonci al la

I. A. E. F. komitato.